

21

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

Enhavo:

- Zahari Zahariev: La verda semajno.
" " Malfruaŭtunaj horoj.
Zefir Slavov: Vespera melankolio. Profeto.
Asen Grigorov: La urbo.
Androgina: Skizetoj.
Nekonata: Konfeso.
Zefir Slavov: Moderna rimo.
At. D. Atanasov — Ada: La bogomilismo.
Unu klarigo. Libroj kaj gazetoj.



BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

STR. CAR BORIS, 69 — SOFIO

Liveras:

Kurso de esperanto, IV eldono (Ada)	20.—	lv.
Praktika gramatiko de internacia lingvo esperanto	3.—	„
Ĉu estas ebla kaj necesa helpa i. l. (prof. Ŝiŝmanov) bulgarlingva	—.—	„
„Esperanto“ (prof. Ŝiŝmanov) propaganda broŝureto bulgarlingva	2.—	„
Paroladoj de Zamenhof (apartaj kajeroj I—V) bulgarl. po Internacia Konferenco por komuna komerca lingvo (Venecia) bulgarlingva	2.— 5.—	„ „
Esperanto-bulgara vortaro (Har. Bačvarov) bindita	50.—	„
„ „ „ „ „ nebindita	35.—	„
Slosilo de esperanto	4.—	„
Esperanto-bulgara frazaro	8.—	„
Albumo de Bulgaraĵ esperantistoj (eld. 1923)	25, 35.—	„
Rememoroj de esperantisto (Ada)	20.—	„
Bulgara Antologio (lv. Krestanov).	100.—	„
Ŝercoj kaj incitoj (200 ludkartoj kun demandoj kaj resp.)	60.—	„
Apartaj numeroj de gazeto „Bulgara esperantisto“		
jaro II, III, IV, kaj V	1.50	„
jaro VI	2.50	„

Insignoj, propagandaj kovertoj, poŝtkartoj, portreto de Zamenhof.

Por poŝtelspezoj oni aldonu: en Bulgario 15⁰/₀, en aliaj landoj 30⁰/₀.

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO:

por Bulgario
40 levoj,
por alifando
2.50 sv. fr.
aŭ egalvaloro

MONATA ORGANO
DE LA BULGARA ESPERANTISTA
SOCIETO

Adreso
de la Redakcio
kaj administracio:
Sofia (Bulgario),
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lerneĵ-bibliotekoj
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

La verda semajno.

Unu fojon dum la jaro sur la malhela ĉielo de la realo ekbrilas pli hele la radioj de la verda stelo. La mildaj radioj de la espero penetras la nebulojn de la fabrika urbo, la seninterrompan bruegon de la maŝinoj kaj la surdigan alarmon de la ĉiam mal-dormanta zorgo, kaj ili flustras grandajn vortojn: Al laboro! Al laboro por vi, por via frato, por la tuta homaro!

Magiaj radioj! — Ĉien penetrantaj! Eĉ la malriĉa, la simpla kamparano, forgesita kaj forpelita en la izolitan kabanon, vekigās kaj vokas: — al laboro!

Unu fojon dum la jaro — la verda semajno!

Unu fojon dum la jaro la esperantistoj scias, ke ili estas tute fordoniĝintaj al laboro por la aliaj.

Amu unu la alian!

Ĉar ne ekzistas io pli granda kaj pli agrabla ol tio — labori por la aliaj. Vi eble estas sola, nura esperantisto, en maro da nesciantoj, meze de aro da neinteresiĝantoj, dormigitaj de la zorgo. Kaj estas malfacile por vi ilin veki. Sed ne malesperu. Fiere flirtigu la flagon de la espero, ĉar vi estas homo! Eble vi tamen dirus: — mi estas sablero, mi estas guto. Malgraŭ tio — ne malesperu! Ĉar ĉu vi ja forgesis, ke la monto estas el sableroj kaj ke el gutoj estas la majesta maro! Ĉar ja hodiaŭ, ĝuste hodiaŭ, kiam la homoj tremas antaŭ la fantomo de la morgaŭa tago, kiam en iliaj oreloj ankoraŭ siblas la grenadoj, ilia spiro ankoraŭ eligas pulvofumon, kaj la korojn premeĝas la Granda Zorgo, via voko estas necesa, via parolo estas savanta!

Hodiaŭ la homaro pleje bezonas apostolojn. Kaj vi estas apostolo, apostolo de la reciproka interkompreniĝo, apostolo de la paco.

Dum la verda semajno vi devas forgesi pri vi, labori nur por la aliaj. Vi devas tion, kion vi posedas, kion vi scias, proponi kaj fordoni al la aliaj. Ne forgesu ke se en la mondo ekzistas nesciantoj, pri tio kulpas la sciantoj, ĉar ili ne instruis ilin, ke se ekzistas neesperantistoj, pri tio kulpas la esperantistoj.

Al laboro, amikoj, dum la verda semajno, je la nomo de tiu, kiu dediĉis sian tutan vivon al laboro por la homaro — de Zamenhof.

Multaj mokos vin, multaj vin riproĉos, multaj indiferece vin preterpasos.

Laboru tamen. Ĉar multaj revenos al vi, kiel la erarinta filo. Kaj la ceterajn — pardonu, ĉar, vere, ili ne scias kion ili faras.

Kaj el la ŝtonoj, ĵetitaj sur vin, la venonta generacio konstruos monumenton de la sennoma esperantisto — de la kavaliro de la verda stelo!

Zahari Zahariev.

Malfruaŭtunaj horoj.

Ci vespere la aŭtun' malvarmon spiras
kaj forŝiras flavfoliojn frosta vent'.
Solaj en hejtita ĉambro nun ni sidas
kaj ni ridas tre kontentaj en silent'.

La minutoj forpasadas en petolo,
tute solaj silentadas ni sen fin'.
Kaj mi sentas nur, sur basko via, kiel
man gracia karesadas milde min.

Sur la ferno frapetadas samovaro,
ludo kara kaj petol' de infanet'.
Kaj simile al vaporo pulsas koro
de l'rigardoj flame ardaĵ en la ret'.

Ve, en la angul' sopiras la piano,
vian manon movas nun la ama sent'.
Mutas ĝi, rigardas ĝi kun buŝ rigida
vi ekridas, — kaj ekregas la silent'.

La horloĝo nin riproĉas el la muro
he, mi scias: ĝin torturas la envi'.
Kor' ekbolas, mi deziras ekparoli
per kis' ŝarma lipojn varmajn ŝlosas vi.

Zah. Zahariev.

Vespera melankolio.

1.

Subiris la sun' en nebuloj.
Krepusko envolas la lagon.
Du nigraj malklaraj okuloj
silente priploras la tagon.

... Postlasis la lasta ĉagreno
 nur larmojn, la larmojn pri tago.
 Kvietas l'animo post soleno —
 samkiel la akvoj de l'lago,

2.

Ora polvo
 la solecan mian ĉelon
 dum la sunsubir' plenigis.
 Forirante
 sun' kuntiris brilan velon —
 en la maron ĝin dronigis.

Ora polvo —
 la solecon ĝi surprizis
 de l'anim', de la maljoja...
 Forirante
 ekamita suno kisis
 larmojn du sur sia vojo.

Profeto.

Mi iras de la lumo tra la dancoj,
 mi flugas tra la spëktro de la pens', —
 kaj min bruligas la protuberancoj,
 kaj la radioj estas akraj lancoj
 vundantaj la aspiron de la mens'.

Mi iras laŭ orbito de komedo,
 laŭ vojo de la fajro al la sun', —
 kaj jam disiĝas la ŝirmanta reto,
 kaj jam firmiĝas paŝoj de profeto
 ehintaj time tra la temp' ĝis nun.

Mi iras — eternulo — tra la mondo,
 pasinte tra l'dezerto de ermit', —
 la penso jam eliris el la rondo,
 la sento jam sin banas en lumondo
 fluanta sub la spiro de l'Spirit'.

Riĝi-Dere.

Zefir Slavov

Samideanoj!

Via devo estas varbi almenaŭ unu alilandan abonanton, por
 ke nia gazeto disvastiĝu tra la tuta mondo.

La urbo.

Siblantaj serpentoj envolvas sin turbe
 en urbo malpura
 kaj ili torturas,
 kaj ili mordetas venene
 la urbon,
 timige kaj preme!

Okuloj senkulpaj, de mil ĉastulinoj,
 (— de mil knabinetoj
 sekvintaj profeton
 kaj vole prenintaj katenojn)
 — destine
 aŭguras malbenon.

Ho, urb' malbenita, satan'-araneo —
 vi glutis nin ĉastaj
 kaj vomis malĉastaj
 sur stratoj ebriaj pro timo: —
 pereu
 kun viaj viktimoj!

Serpentoj siblantaj inside altrampas
 kun korpoj malvarmaj —
 kaj krion alarman
 eligas mil gorgoj perturbaj:
 sanganta
 helpkrio de l'Urbo.

Asen Grigorov

Skizetoj.

1. KANTETO.

Grīmacanta ĉielo, kvazaŭ ĝi pereon antaŭsignas. Nebule
 ĉie. Korva grak' sin portas super min — misprofetaĵo.

Nudaj arboj kaj dezerteco.

Ĉu estas same ĉe mi — mi ne scias!

Min atingas voĉo — tie tra la arbaro: mi rigardas — eta
 knabino kolektas sekbranĉojn kaj kantas gajan arĝentan kanteton!...

2. FABELO.

„Rakontu al mi iun fabelon“, la vagulo diris, „kaj mi rakontos
 al vi „La fabelon de mia vivo“.

„Ne! Rakontu al ni unue la vian, avo“, la infanoj diris. „Ni
 faros grandan fajron kaj sidos dum tuta la nokto — nun estas
 ja la noktoj de l'sorĉaj fabeloj.“

Kaj li rakontis al ili „la fabelon de sia vivo“, kaj ĉiuj infanoj ploris!

La proksiman nokton ili rakontis al li la ĉi-saman fabelon pri lia vivo.

Cu li ne ploris? — Ho, kiom da larmoj li verŝis! . . .

3. LIBRO.

Antaŭ mi kuŝas ia libro — Dio scias kiu! — La vento nur interesiĝas pri ĝi kaj turnas folion post folio kaj subite haltas, kvazaŭ ĝi devus ĉi-loke enprofundiĝi . . .

Mi rigardas la malfermitajn paĝojn kaj en unu anguleto legas:

Amiko, ĉu pravas la vortoj de l'aŭtoro nekonata:

„ . . . ne voku ĝin, ĉar la vento blovos kontraŭ via voĉo kaj ĝin forportos malproksimen . . . “.

4. LETERO.

Kaj mi malfaldis mian iaman leteron, por ĝin legi al ŝi.

— Ne, ŝi diris, ĝi estas tiel longa — diru mallonge ĉion.

Iom honteme mi kliniĝis kaj apenaŭ aŭdeble flustris: „sekreto neaŭdita“.

Ĉu ŝi min komprenis?

5. PORTRETO.

He, pentristo, vi tro rapidis kun mia skizo:

vi forĝesis la nuancon de mia silenta malĝojo: viŝu for de miaj lipoj ĉi tiun rideton — glaciigu ilin unu ĉe l'alia tiel, ke oni per preteranta rigardo povu senti ilian malvarmeton — ja ili estas tiel malvarmaj. Sur mia frunto estas apenaŭ tranĉitaj sulkoj, sed ne opiniu, ke tio estas pro maljuneco — tute ne!

Sed kio do? — vi forĝesis tion, kio min similigus al mi — la naivan rigardon!

Sofia.

Androgina

Konfeso.

(El la albumo de esperantisto).

Mi faris krimon. Pro vi.

Hieraŭ, vizitinte mian kamaradinon, mi vidis inter ŝiaj libroj vian albumon. Ŝi estis skribinta al vi ion kiel memoraĵon kaj estis pretiginta la albumon por ĝin redoni al vi. Kaj sen ŝia scio mi ĝin metis en mian poŝon. Mi ĝin ŝtelis. Ne maltrankviliĝu tamen. Morgaŭ nerimarkite mi ĝin remetos inter ŝiajn librojn. Mi ĝin redonos, ĉar mi volas ke vi havu ĝin en viaj manoj kaj ke vi legu la jenajn liniojn.

Krimo, ĉu ne? Ĉin faris pro vi tiu, kiu vin amas kaj kiun vi ne konas. — —

— Estis vintra posttagmezo. Mia kamaradino preskaŭ perforte min trenis al via gimnazio, kie okazis ia esperanta kunveno.

Vi devis paroladi. Neniel tio interesis min. Mi konis nek la esperantistojn nek vin. Ni eniris. Ene — gelernantoj de la diversaj gimnazioj. Vi ekparolis. Komence mi ne atentis pri via parolado kaj ĉirkaŭrigardis la ĉeestantojn. Foje vi diris ion, kio interesigis min. Mi kaptis tiun penson kaj atente ekaŭskultis. Vi parolis pri la amo inter la homoj de diversaj popoloj. Kaj via parolo estis tiel sincera kaj tiel flama. Do mi tion ĝis nun ne sciis? Mi estis blinda? Kaj ĉio-ĉi, kion vi parolis, ŝajnis al mi tiel ebla kaj tiel bela! Mi kredis. Mi ne bezonis la pruvojn. Tiu eta flamo, lumanta en via okulparo, varmigis la korojn kaj la kredon kaj tio estis la plej bona pruvo. Vi parolis, ke ĉiuj homoj sur la terglobo estas fratoj, ke ili estimas kaj amas unu la alian kaj se ili iras militi, tion ili faras ne propravole, sed perfortate de reĝoj kaj de registaroj. Kaj mi rememoris, kiel unu aŭtunan tagon oni fortrenis mian plejaĝan fraton al milito kaj li, li ne plu revenis. Kaj kiel ni ĉiuj hejme amis lin! Klininte mian kapon, sub la poŝtuketo mi mallaŭte ploris. Al mia animo fariĝis malgaje, kaj poste hele kaj ĝoje, ĉar miaj okuloj jam estis malfermitaj — mi vidis. Vi parolis. Mi sentis, ke mi mem estas tiel emociita kiel vi, kaj ke mia koro batas samtiel maltrankvile, kiel ankaŭ la via. Mi sentis, ke ankaŭ ĉe mi ekĝermas tiu granda tuthomara amo, kiu vibris ĉe vi. Kaj la malamo, flegata kontraŭ tiu popolo, kiu mortigis mian fraton, iom post iom malaperis. Ĉar ankaŭ ili militiris kaj mortigis, ordonate kaj mincate per mortigo de siaj estroj, kiel ankaŭ mia frato. Ili estis senkulpaĵ, malfeliĉaj. Kaj mi ekamis ilin. Kaj pleje mi ekamis tiun, kiu venkis mian malamon kaj ĝin ŝanĝis per amo — vin!

Mi dankas vin. Enanime mi jam estis via kunulino laŭ ideoj. Kiam vi finis, vi hazarde ekrigardis min. Mi ridetis al vi. Mi scias tamen, mi estas certa, ke vi ne konservis min en via memoro, ĉar ĉiuj, kiujn vi ekrigardas, ridetas al vi. Kaj eble ĉiuj vin amas!

Tio estis dum malvarma vintra tago. Mi tamen ne sentis la froston, ĉar en mia animo estis varmo. Kiam mi revenis hejmen mi jam estis tute aliĝinta.

Nun estas Majo floranta. Depost tiam pasis multaj noktoj de maldormo, noktoj plenigitaj nur de unu bildo, de unu revo, de unu amo, minacanta eksplodi.

Nun estas unua horo post meznokto. La nokto delonge dezirata. Mi volis diri al vi, ke dum vi dormas kaj ripozas, unu koro maltrankvile batas pro vi. Mi tamen ne volas sciigi al vi kiu mi estas, mi ne volas

— ĉar mi volas esti en la vico de tiuj miloj da nekonataj homoj, tiel flame amataj de vi,

— ĉar mi volas, ke vi sciu nur tion: ke ankaŭ en mian animon falis unu el la semeroj de la tuthomara amo, kiun vi semas, kaj ke mi estas nur simpla kaj modesta spiko en la grenkampo, ĉirkaŭblovita de la mildo de via amo,

— ĉar mi volas, ke via amo, forta kaj potenca, ne limiĝu nur por unu animo, sed ke ĝi sin disen verŝu kiel torento por refreŝigi multe da velkantaj kaj senkrediĝintaj koroj kaj ke ĝia ardo ilin varmigu kaj al ili diru, ke ekzistas tamen io, por kio oni povus vivi,

— ĉar mi volas resti nur unu

Nekonata, kiu vin amas.

Moderna rimo.

Mi legis iam noton en esp. revuo pri la bezono de eltrovo de plia abundo da rimoj por nia poezio. La aŭtoro, ŝajnas al mi, malaprobis la uzadon de proksime sonantaj finvortoj — kio nuntempe pli kaj pli renkontiĝas ĉe la moderna poezio, speciale la rusa kaj la bulgara.

Forpasas la tempo, kiam la poetoj vanuzis klopodojn por serĉi rimojn, en kiuj sin ripetas tri, kaj kvar, kaj pli da silaboj. Ofte oni per tio celis ne la muzikecon ĉe la versoj, sed simple deziris montri sian kapablon ludi per la lingvesprimoj kaj tute senpene trovi plenajn rimojn. Estas ankaŭ nun tiaj poetoj. Sed, pensante pri tio ĉi, mi devis respondi la demandon: ĉu oni ĉiam egale komprenis kaj sentis la poezian belon de la rimo.

Nia esperanta poeziverkado estas kompare tre malriĉa por ke oni povu esplori la naturan evoluon de la kompreno pri la rimo. En la unuaj versaĵoj estis multaj lingvaj kaj poeziteoriaj eraroj kaj mankoj. Kiam oni sin trovis en embaraso — oni apostrofis adjektivon por fari rimon. Zamenhof komprenis tre bone, ke ne estas bele apostrofi adjektivon. Kaj liaj versoj estas modelo de lingvokono kaj kono de la postuloj por bona versado. Por havi rajton sin nomi poeto, la poeto posedas — 1. la lingvon kaj 2. la poeziteorion. Ĝi estas scienco kiun ĉiu povas studi kaj lerni. Sed la poeto devas posedi same, krom animon, kiu perarte sin esprimos — same — 3. kapablon, kiu igos lin senti la internan sencon de la vortoj, ties enkaŝitan muzikon kaj ties traviveblan spiritan kvaliton. Li devas elekti el multaj konvenaj vortoj tiun, kiu plej konvene impresos, plej profunde sentigos pri la objekto aŭ pri la ideo. Ĝi estas arto, kiun ne multaj posedas.

Specialan atenton meritas la finvortoj de la versoj. Ili estas en nenia privata interrilato — tiam la versoj estas „blankaj“ aŭ ili estas same aŭ simile sonantaj ĉe la fino — kaj tiam la poezio estas plie ligita kun la muziko, kio ĝin faras pli agrabla por la orelo. La antikvaj verkistoj ne konis, ŝajnas al mi, la rimon. Same en la popolkantoj ĝi ne estas uzata. Nur en iuj popoldiroj, proverboj k. a. oni povas renkonti ĝin. Nun por ni estas preskaŭ nelegebla, teda, tro peza la senrima versaĵo aŭ poemo.

Dum la lastaj jaroj disvolviĝis unu nova poezio, kiu portas en sia primitive elforĝita ofte, kvazaŭ ŝtala sed tamen luksa verso la specifikaĵojn de nia epoko. Ĝi estas rapida, disĵetita, sen

trankvila. La penso estas esprimata simbole, per vortoj fremdaj al la rekta homa esprimo. La bildo estas nebulita, neĝisfinita, nur skizita per kelkaj strekoj. La belarto, samkiel la filozofio kaj la sciencoj, travivas la saman periodon de serĉado de la novo, kiu serĉado plenigas la politikan kaj ekonomian vivon.

Oni predikas laŭte pri meminiciativa instruo en la lernejoj. Oni senhalte serĉas — en ĉiuj regionoj de la homa vivo kaj scio. La homo devas esti kapabla mem observi kritike la ĉirkaŭan mondon, mem kompreni la sekreton, la sencon, la valoron de la objekto kaj eluzi ĝin. Oni esploras kaj trovas. En ĉiu homo estas fajro dia — diris Tolstoj. La simileco devas esti trovita. Tiam estos facile kompreni la tutan mondon kaj venigi sin en harmonion kun la universaj fortoj. Komprenu, ke ĉio estas parto, estas aparta organo de unu majesta organismo, komprenu, ke vi, homo, estas ne io sendependa, io havanta nenion komunan kun la universo, sed male — vi estas necesa ĉenero en ties konstruo — kaj vi tuj multon ekscios, kaj vi, homo, tuj multon eksentos koncerne al la ĝua spirado de la animo en la ekzotika belo.

Mi parolis pri la rimo. Estas la sama afero. Ni bezonas apostrofi nek adverbos nek adjektivos. Estas sufiĉa la escepto pri la substantivo. Estas alia la demando pri la tiel nomataj nepuraj, neplenaj rimoj. Antaŭe ni ne povis toleri „malpuran“ rimon kaj konsideris ĝin sekvo de nebona kono pri la poeziteorio. Malagrabla gratis nian oreton kunrimigo de „kara“ kaj „maro“ ekzemple, kaj ni estis preskaŭ pretaj deklari nesperta en la lingvo la poeton, kiu permesis al si uzi similaĵn rimojn. Nun nia kompreno ŝanĝiĝis. Iom post iom ni komencis konvinkiĝi, ke kiel ĉie, tiel same en la poezio la blovo de la nova vento devas fari ŝanĝon. Devas renversi la komprenojn. Devas alporti novajn formojn kaj igi nin kompreni alie la ekzistantajn. Kiel en la tuta versaĵo, tiel ankaŭ en la rimo oni devas serĉi la sencon, la internan harmonion, la belon. Ni sentas plezuron kiam ni fine sukcesas malkovri la sekreton. Ni ĝuas la konscion de kleraj, spirite inteligentaj homoj, kiam ni povas suprenigi la vibradojn de nia animo ĝis ekvivo en unisono kun la animo de la poeto, kiu — sentante ian internan devigon por tio — kunforĝis multajn ŝajne sen ia ajn rilato inter si vortojn kaj bildojn kaj volis per tio ĉi esprimi tiujn nuancojn de penso kaj sento, kiujn la evoluinta en la sentado animo povas rimarki kiel palajn ombrojn trapasantajn ĝian ĉielon.

Kaj nun la poetoj ne povas toleri same la klaran rimon, kiel la klaran sencon en la versoj. Ili ne nur ne evitas la nepuran rimon, ne nur konsideras ĝin taŭga kaj konforma al la postuloj de la bela poezio, sed ili ĝin intence uzas, preferante la nebulon de ĝia kunsono. Ĉar la klasika belo trovas ĉiam malpli kaj malpli da adorantoj. Ĉar ni ne havas la paciencon de la malnovaj kaj ties pezan, mezuritan trankvilon. Oni ne devas rakonti al ni: ne, diru al ni du vortojn kaj lasu nin konjekti. Ne kunmetu du samfinajn rimojn: tio estas nun banala, neagrabla ĝi ekscitas. Rimigu

du proksime nur sonantajn vortojn kaj ni trovos la komunan ĉe ili, ni kaptos la nebulan muzikon kaŝitan en ili.

Ce ni atentigas al si per libera kaj sperta rimado Asen Grigorov kaj Zahari Zahariev. La unua uzas kiel rimojn: vivanta — kantas, granda — ekdemandos, glavo — havas, eĉ cindro — mortintaj... La dua: papavo — ravaj, domo — homojn, nigran migro, sojlo — mola, mano — panjo... St. Guĵev: eterna — sternas, malsanon — fontanoj, mortaj — vortas. Ivan Dobrev: li ja — sian, pia — tial, bonon — mono. Marko Bunin: hor' — mort', hund' — kun, urb' — tambur'. Teodor Popov: sunradioj — miaj, birda — flirta. Miti: vesperiĝ' — feliĉ', eterne — sternu... ktp. ktp.

Do — laŭ mi ne manko estas la neplena, la „nepura“ rimo. Ofte estas eĉ avantaĝo. Kaj oni ne timu: kiu ne estas poeto ne povos por poezio eluzi la abundon el novaj, se ni povas tiel diri — liberaj rimoj. Kaj tamen la poeton ne devas ligi la kadro de la klasika rimo, kies regado forpasis. La severaj klasikanoj devas konsenti almenaŭ pri tio, ke la ekzistanta rimvortaro estas jam nesufiĉa, ke ne estas alia rimedo plivastigi ĝin krom per la sankcio de la libera, similsona rimo. Eble venos tempo, kiam ĉiuj komprenos, ke en la mondo ne ekzistas du plensimilaj objektoj, ke ni ne devas klopodi kopii ion laŭ preciza modelo, sed nia tasko estas trovi la similecon inter la elementoj, tion, kio interligas ilin, kaj kio laŭ unuj estas saĝo, laŭ aliaj muziko kaj laŭ triaj amo.

Zefir Slavov

At. D. Atanasov — Ada.

La Bogomilismo.

(Populara histori — sociologia skizo).

Tre ofte ni, la esperantistoj, en nia internacia vivo, en niaj rilatoj kun fremduloj, falas en la situacion serĉi ion valoran, ŝatindan en nia nacio kaj en nia historio, por prezenti ĝin al la fremdaj samideanoj. Niaj korespondantoj ofte interesiĝas pri nia popolo kaj ĝia pasinteco; ili rakontas en siaj leteroj pri siaj popoloj kaj demandas de ni informojn pri la nia. Sed kiel ni povus doni informojn, se ni mem ne konus ilin? Tiamaniere en multaj okazoj tiu komuniĝado kun fremduloj instigas nin pristudi pli detale nian propran popolon, nian propran historion. Dank' al tiu vivo ni komencas pensi, kio do valora estas en nia popolo kaj en ĝia pasinteco, per kio ni povus prezenti nin inde al la fremduloj. Ni komencas taksu la faktojn en nia historio, analizi ilin kritike, ĉar nur kiam ni mem komprenas ilin bone, ni povos klarigi ilin al fremduloj.

Kaj jen aperas io, kio eksonus kiel paradokso en la oreloj de la ŝovinistoj, kiuj vidas en la internacia vivo grandan danĝeron por la nacieco kaj por la patriotismo: per esperanto kaj pro nia internacia vivo ni estas akcelataj al mem-ekkono kiel nacio.

Ni devas noti, ke la plimulto el la bulgaroj tre neŝufiĉe kaj nedetale konas la faktojn en la bulgara historio kaj ilian signifon. Kaj tre ofte ili estas embarasataj, kiam ili ekdeziras prezenti sian popolon per io rimarkinda kaj valora.

En la vivo de la bulgara popolo dum la pasinteco ni rimarkas du fluojn, kiuj alterne dominas en ĝi: unu estas la fluo militema, kiun testamentis la antikvaj reĝoj Asparuh, Krum, Boris, Sirneon kc., la alia — la fluo kultura, kiun testamentis la du fratoj Kiril kaj Metodij (kreintoj de la bulgara alfabeto kaj de la bulgara literaturo), kaj la pleado de antikvaj verkistoj: Kliment, Ĉernorizec Ĥrabr, la ideologoj de novaj movadoj kiel Bogomil, Jeremia kc.

Malfeliĉe ĝis nun oni pli multe popularigadis la unuan flankon de nia historio. Ĉiu bulgaro scias pri la gloraj venkoj, pri sango-versaj bataloj de tiu kaj de alia reĝo, sed tro malmultaj scias pri la populariĝo de la bulgara hereza penso per la bogomilismo ĝis Franclando, pri la partopreno de la bulgaraj komercistoj en la foiroj de la flandra lando, pri la kleriĝo de la rusoj, ĉeĥomoravoj, serboj kaj eĉ rumanoj per bulgaraj instruistoj kaj per bulgaraj libroj.

Kiam bulgaro ekintencas prezenti sian popolon en ĝia pasinteco per tio, kion li mem scias, li vidas, ke li devas sciigi nur pri militiroj, sangaj bataloj, plivastigo de la lando, intrigoj en la reĝa palaco, mortigo de reĝoj . . . Sed li tuj komprenas, ke ne estas ĝuste tio, kio prezentos lian popolon en bona lumo antaŭ la fremduloj.

Kaj li ekserĉas la duan flankon de nia pasinteco. Kaj tiam li vidas, kiom malsufiĉe li konas en tiu rilato sian historion.

Interparanteze mi povas noti, ke en la ĝenerala historio de ĉiuj popoloj sur la tero viciĝas interplektite la aluditaj du fluoj: militemo kaj kulturo, kiuj devus elimini unu la alian. La kulturo kreas, la milito detruas. La kulturo donas al ni domojn, urbojn kaj vilaĝojn, vojojn, transportilojn, rimedojn kontraŭ malsano, oportunecon, dum la milito emas forpreni kaj neniigi ĉion ĉi, escepte en la okazoj, kiam ĝi povos esti uzata por la atingo de ĝiaj celoj. Unuflanke la medicina scienco penegas trovi rimedojn por savi la vivon de la individuo, por forigi ĉiun difekton kaj malsanon. En la sama tempo la milita arto serĉas rimedojn, per kiuj ĝi povus per unu fojo ekstermi plej multan eblan kvanton da homaj vivoj. Kaj kia ironio de la „kulturo“! La sama ĵurnalaro glorigas scienculon, kiu eltrovis novan rimedon kontraŭ danĝera malsano, kaj samtempe ankaŭ scienculon kiu eltrovis efikan batalilon, sufokan gason, fortan eksplodilon, grandkalibran kanonon, mortigajn radiojn! Kaj unu sama publiko admiras la laboron de ambaŭ scienculoj, el kiuj unu savas, la alia pereigas la homan vivon . . .

En la historio de nia popolo, kiam dominis la fluo, testamentita de Kiril kaj Metodij kaj de ĉiuj laborintoj por klereco kaj kulturo, nur tiam heliĝis la horizonto de la popola estonteco, tiam aperis espero pri belaj tagoj en paco kaj evoluo. Kaj se tia pe-

riodo estis iam pli longa (kio bedaŭrinde okazis tro malmulte) nia lando eksimilis belan ĝardenon, kiu ravis la okulon de ĉiu fremdulo, vizitinta ĝin en tiu feliĉa momento: oni kreadis, la popolo vivis pace, laboris kaj plugis, paŝtis siajn brutarojn, kantis siajn belajn kantojn, kaj entreprenemaj bulgaroj en longaj komercaj karavanoj veturis al Konstantinopolo, Saloniko, Venezio, al la foiroj de la okcidenteŭropaj landoj kaj portis tien lanon, mielon, vakson, felojn k. a.; en la urboj metiistoj prosperis, al la lando venadis fremdlandaj komercistoj kaj portis tion, kion la bulgaro ankoraŭ ne povis produkti...

Sed, kiam venis la momento, en kiu la popolo eltiris glavon kontraŭ aliaj popoloj, tiu ĉi idilia bildo, promesanta feliĉan vivon, malheliĝis. Venis malbono. Timo enhejmigis la plugiston, la butikoj de la metiistoj fermiĝis, bariĝis la komercaj vojoj, dezertiĝis la kulturataj kampoj. Sango kaj bruĵo — kaj post ĝi — mizero, malriĉeco, spirita kadenco.

Nia nuna mizera stato estas postsekvo de la milito, estas postsekvo de tio, ke la popolo ekiris la vojon, testamentitan de Asparuh kaj Krum.

Kaj, rigardante la nunan malhelaŝpektan staton de nia popolo, des pli ni devas kompreni, ke ĝia savo estos nur en la sekvado de la kultura vojo. Kaj ni devas lerni tiun ĉi vojon, ni devas scii la testamenton de tiuj, kiuj iris sur ĝi en la pasinteco.

Mi jam diris, ke en tiu rilato estas io valora kaj instrua en la historio de nia malmulte konata popolo.

„Estas floroj en nia pasinteco“ diras Nikolaj Rajnov en la antaŭparolo de siaj „Bogomilaj Legendoj“. — „Apud la flamantaj kariofiloj estas vidata malvarma hiacinto, — kaj el la krepusko de nia antikveco estas aŭdataj militaj krioj. Desegniĝas klare apartaj insuloj de la adorrigardado, kie anakoreto kun nigraj haroj kaj perlamota vizaĝo skribas runojn de la misteroj sur pergamenton, pentras inicialojn kaj miniaturojn, kaj kolorigas ilin per okro, indigo kaj cinabro. — Kaj kvazaŭ susuranta orfabelo portiĝas legendoj pri la monaĥo, frato de l'reĝo Petr, ke li sorĉas kaj kuracas, ke li mortigas per rigardo kaj konas la grandajn arkanojn de la Orienta Klero. — Kaj portiĝas famo pri li kaj pri multaj kiel li, ke ili konas novajn verojn, ke ili batalas kaj mortas pro ili, venenite malantaŭ la velura kurteno en la reĝa palaco aŭ mortigitaj en la malsekaj malliberejoj de Bizancio kaj Preslav. — Kaj nun ni apenaŭ povas ekkredi...“

Jes, ni nun apenaŭ povas ekkredi, ĉar ni ne konas bone nian propran historion kaj ni aŭskultas multajn detalojn el ĝi kvazaŭ fabelon, legendon el malproksima, malpropra popolo.

Estas floroj en nia pasinteco, kiuj meritas esti prezentataj al la fremduloj, kaj unu el tiuj floroj estas certe la bogomilismo. Ĝin mi intencas prezenti nun al la legantoj.

La konceptoj pri la bogomilismo ĉe la bulgara inteligentularo mem estas elfunde diferencaj. Dum unuj aŭtoroj vidas en ĝi nur negativan socian fenomenon, preskaŭ la prakaŭzon por la malfe-

ĉiĉoj de la bulgara popolo en la sekvintaj jarcentoj, kaj mencias kun teruro ĝin en libroj kaj artikoloj, aliaj rigardas ĝin kun adoro kiel plej ideala spirita movado kaj ne permesas, ke oni supozu eĉ plej malgrandan makuleton en ĝi.

Tiu ĉi duobleco en la opinioj kaj ilia ekstremeco plej evidente montras, kiom interesa devas esti tiu ĉi movado kaj inkliniĝi ĉiun konatiĝi kun ĝia esenco mem, por povi juste ĝin pritaksi.

La celo de mia jena verketo estas montri la aperon de tiu ĉi movado, la esencon de ĝia instruo kaj ĝian signifon.

Mi tuj devas noti, ke ĝis nun la scienco disponas tre malmultan materialon por esplori detale tiun ĉi movadon en ĉiu flanko. Pro tio mi eble ne dirus pli multe ol tiuj, kiuj ĝis nun pristudis ĝin. La historio disponas du ĉefajn fontojn por konatiĝi kun la bogomilismo: la verko de la bizantia verkisto de XI jarcento Eŭtimio Zigaben (aŭ elparolata en la novgreka lingvo Zigavin) Πανπλία δογματική (Dogma plenarmiĝo), kies latina traduko havas titolon „Narratio de Bogomilis“ (Rakonto pri la bogomilanoj), kaj la kolekto de artikoloj de la bulgara verkisto de X jarcento Presbitero Kosma „Besedi na novopojavivŝujusja eres Bogomilovu“ (Referoj pri la noveaperinta herezo de Bogomil). — Ambaŭ verkoj estas skribitaj de kontraŭuloj de la bogomilismo. Pro tio parto el iliaj atestoj devas esti akceptata kun granda rezervo. Pure bogomilajn fontojn ni preskaŭ ne disponas: la literaturo de la bogomilismo estis persekutata kaj neniigita. Parto el iliaj rakontoj kaj fabeloj restis, miksitaj kun la ceteraj popolaj rakontoj kaj apokrifaj verkoj, sed tute modifitaj en ortodoksa spirito, kaj oni povas malkovri en ili nur apartajn elementojn, kiuj tute ne laŭiras la ortodoksajn principojn, sed havas la karakteron de la bogomilanaĵoj.

Krom la suprecititaj du gravaj verkoj, pri la bogomilismo ni trovas notojn kaj izolitajn menciojn en multaj malnovaj kronikoj aŭ aliaj dokumentoj, kaj ĉiu el tiuj notoj jetas iometan lumon al tiu movado. Inter tiuj dokumentoj estas la „Sinodikt“ de reĝo Borilo — dokumento pri la juĝo al la bogomilanoj de speciala juĝkongreso en Bulgario. Pri tiu dokumento mi parolos poste.

La bogomilismo estas religihereza movado kun socia karaktero. Por kompreni ĝin bone, ni devos ekrigardi al ĝi per la okuloj de sociologo. Ni devas do unue vidi, en kia historia momento ĝi aperas, kia estis la socia ordo kaj stato en la unua kaj dua bulgaraj regnoj.

Kiel naskiĝis la bulgara ŝtato sur la Balkanoj? Oni scias tion. Ĉirkaŭ la 6-a kaj 7-a jarcento post Kristo, kaj eĉ antaŭe (laŭ iuj historiistoj) el nordo — el la regionoj ĉirkaŭ la Karpata montaro — venis sur la Balkanan duoninsulon multaj slavaj gentoj, ekmovitaj per la granda transmigro de la popoloj. Ili invadis la lokojn inter Danubo kaj la Egea maro, inter Nigra kaj Adria maroj, sed tute ne intencis starigi sian regnon, pro tio

baldaŭ Bizantio, kiu regis tiujn regionojn, ĉesigis sian malamikecon kontraŭ ili, konsideris ilin kiel siajn ŝtatanojn. Kaj en ili efektive ĝi trovis bonan kaj laboreman loĝantaron. Sed pli malfrue el nordo transpasis Danubon alia gento — jam ne tiel pacema kaj laborema, sed de tute alia etnografia deveno kaj kun granda militemo. Ĝi estis la hordo de Asparuh, aŭ Isperih, ĥano de unu parto el la gento „bulgaroj“ — gento, parenca al la hunoj.

Jam la bulgara hordo venis ĉi tien por konkeri tiujn fruktodonajn regionojn. Ĝi facile subigis kelkajn slavajn gentojn en la nuna Dobruĝa, kaj iom post iom ekaspiris disvastigi sian regnon suden kaj okcidenten. La slavo estis pli multaj; post kelka tempo — du jarcentoj eble — la plenmano da bulgaroj, per edziĝoi, tute fandiĝis kaj asimiliĝis en la slava amaso, sed ĝia nomo restis kiel nomo de ĉiuj slavaj, kiuj eniris en la nova ŝtato. La ŝtato fariĝis slava, kaj la aspirado jam estis unuigi ĉiujn ceterajn slavajn gentojn en la nova ŝtato, deprenante ilin de Bizantio.

Tiu ĉi ŝtato devis jam militi kun Bizantio, por sankciigi sian ekziston, ĉar ja ĝi okupis teritorion de la Bizantia imperio. Dum ses jarcentoj daŭris kun multaj peripetioj tiu ĉi batalado, kaj la ŝtato sukcesis firmiĝi. La apudeco al Bizantio, kiu en tiu epoko estis granda kultura centro, helpis ankaŭ al Bulgario altiĝi kaj akiri, vice kun la politika, ankaŭ kulturalan signifon por ĉiuj najbaraj popoloj kaj regnoj. Unu centjaro, pasigita en jugo sub Bizantia regado, dividas la malnovan bulgaran historion en du partoj: unua regno, de la fondo de l'ŝtato ĝis ĝia falo sub Bizantio, kaj dua regno, de ĝia reliberiĝo ĝis ĝia falo sub la turkoj.

(Sekvos).

Unu klarigo.

En ligo kun mia verko „Rememoroj de Esperantisto“, Sinjoro Teodor Kanev sendis al mi kelkajn klarigojn, kiuj certe estas sciigendaj al la samideanoj, tial mi petas la estimatan redakcion de „Bulgara Esperantisto“ publikigi la leteron de Sinjoro Kanev en la revuo. La originalo de la letero estas skribita en esperanto de Sinjoro Kanev mem.

Sofio, 6. X. 1925.

At. D. Atanasov.

Sofio, la 5-an de Septembro, 1925.

Al Sinjoro **Ada** (At. D. **Atanasov**) — Sofio.

Kara Sinjoro,

Estas mia devo danki vin pri via boneco donaci al mi ekzempleron de via verko „Rememoroj de Esperantisto“, kiun mi legis kun granda intereso, des pli ke vi ne tralasis el viaj memoroj mian modestan personon estinta unu el la agintoj de la „unua generacio“ de la Esperanto-movado en Bulgarujo. Mi eltiras de via verko bonajn impresojn.

Kvankam ĝi ne estas historio de la Esperanto-movado en Bulgarujo, kiel vi mem diras, ĝi havas historian signifon, ĉar vi estas unu el la plej aktivaj pioniroj de la movado.

Ĝi fliom kiom mi estis ankaŭ en tiu movado, mi povas certigi, ke la faktoj estas vere priskribitaj. Kompreneble oni povas fari kelkajn rimarkojn pri iuj faktoj antaŭ via eniro en la movado, sed tiuj ĉi rimarkoj estas sensignifaj kaj ne povas mallumigi vian belan verkon.

Vi ne forjetis ankaŭ la faktojn ĉirkaŭ mia forlaso de Esperanto kaj fariĝo idisto. La faktoj pri tio ĉi estas ankaŭ veraj. Mi parolas nur pri la faktoj de mia forlaso de Esperanto kaj ne pri viaj komentarioj pri ĝi kaj pri Ido, kun kiuj mi ne povas kompreneble konsenti.

Mi volas tamen halti je la fakto, pri kiu oni multe parolis kaj skribis, kaj kiun vi denove komentarias por klarigi ĝin. Vi skribas sur la paĝo 73: „Ĝis tiam li (t. e. mi) ne povis eldoni sola la esperantan lernolibron „Esperanto en dek lecionoj“. — Mi tradukis tiun ĉi lernolibron ĵus fininte la gimnazion, kiam mi atendis ĉion de mia patro. Ĉu mi povis tiam pensi eldoni la libron? Tial Sinjoro Oreškov eldonis ĝin kiel eldono de la Klubo „Stelo“ *), kiam mi estis foririnta en Bruxelles. Por la dua eldono mi donis al Sinjoro Oreškov la duonon de la antaŭpago al presisto, 80 levojn (tiam valoro), kaj mi signis la polison kiel garanto por la resto. Poste Sinjoro Oreškov pagis la polison kiam li ricevis monon de la vendo de la libro, sed mi ricevis nenion ĝis nun de la mono donita por tiu eldono. Tion mi ne bedaŭras, ĉar mi donis la monon por la ideo. La trian eldonon Sinjoro Oreškov faris sen mia konsento nek scio.

Vi diras ke Couturat proponis al Sinjoro Krestanov monon por eldoni idajn lernolibrojn bulgarajn. Tion mi ne scias kaj mi povas diri nenion pri ĝi. Kunligante tion kun mia okazo, vi konkludas, ke Couturat ankaŭ proponis al mi monon, kaj sen esti dirite, oni konkludas ke mi fariĝis idisto por mono. Ĉio dirita ĉirkaŭ tiuj eldonoj estas malklara kaj tiel sciigita, ke oni nepre faros tian konkludon. Tio prave indignigis min. En viaj rememoroj vi klarigas tiun ĉi bruon, dirante ke mi ne komprenis ĝin bone. Tamen via klarigo ankaŭ ne estas klara ligante ĝin kun la dirito de Krestanov. Ĉiuokaze mi dankas vin pri tiuj klarigoj. Tamen mi devas ankaŭ korekti la faktojn priskribitajn de vi.

Laŭ viaj rememoroj mi dissendis en 1911 senpage kun mia cirkulero ĉiujn miajn eldonojn cititajn de vi. Kaj kiel vi citas ankaŭ mian lernolibron „La Lingvo Internacia en dekdu lecionoj“, oni komprenas ke ankaŭ tiu ĉi libro estas dissendita kun la cirkulero. Mi dissendis tiam nur la aliajn cititajn eldonojn kun la cirkulero, sed ne ankaŭ la lernolibron kiu aperis unu jaron pli malfrue (1912), kiu estas eldonita per miaj rimedoj kaj kiu ne estis dissendita senpage. Jen la vera fakto pri tiuj eldonoj: Post kiam mi forlasis la sekretariecon de la Ligo kaj Esperanton, mi, korespondinte kun Couturat, skribis al li, ke mi presigas cirkuleron, ke mi tradukis „La Reformo Justifikata“, „La Guidlibreto“ kaj „La Klefilo“, ke estus bone dissendi tiujn libretojn kun la cirkulero, sed mi povas presigi nur la cirkuleron, sed ne ankaŭ tiujn librojn. Tiam Couturat skribis al mi, ke li estas preta pagi la elspezojn kontraŭ fakturo de la presisto, informinte sin antaŭe pri la kosto. Poste li pagis la fakturojn (ĉirkaŭ 200 frankojn).

Plie mi devas korekti la citaĵon de paĝo 74 de miaj paroloj pri la elspezita mono de Couturat. Mi diris al vi: „Dum estis viva Couturat li elspezis sufiĉan monon por Ido“, sed ne kiel vi tradonas miajn parolojn „li dissemis multegan monon senkonte“. Mi ne estis kontisto de Couturat kaj mi ne scias, ĉu li elspezis senkonte multegan monon, sed mi ne dubas ke li elspezis monon por broŝuroj kaj por Progreso.

Sed ĉu tio ĉi estas kulpo, estas krimo? Ĉu sindonemaj esperantistoj ne elspezis por Esperanto, kiam tio ĉi estis necesa por konigi kaj propagandi ĝin. Ĉu la revuo „Lingvo Internacia“ ne ekzistis dum siaj unuaj jaroj per la oferemeco de Trompeter, kiu sola pagis la elspezojn por ĝi, ĉu la propagandaj broŝuroj esperantaj ne estis eldonataj dum la unuaj jaroj per propraj rimedoj de esperantistoj kaj disdonataj senpage, ĉu al Sinjoro Oreškov kostas nenion la eldonoj de la Klubo „Stelo“, ĉu „Danubo“ ne

*) La klubo „Stelo“ en Plovdiv estis nur Sinjoro Oreškov, al kiu helpis laŭ niaj fortoj mi kaj Sinjoro G. Atanasov. Tiam ne estis aliaj esperantistoj en Plovdiv kaj la Klubo ne havis aliajn aktivajn anojn. Pli-malfrue, kiam mi revenis en Plovdiv, mi trovis R. Rajĉinov. La Klubo havis nenian rimedojn kaj ĉion elspezis Sinjoro Oreškov.

mortis post la morto de D-ro Robin kiu elspezis por ĝia eldonado, ĉu la Centra Oficejo en Parizo ne estis fondita per la mono testamentita de D-ro Javal, ĉu hodiaŭ ne estas esperantistoj kiuj donacas monon por la propagando de Esperanto?

Kiu povas jeti koton kaj akraĉi tiujn ĉi noblajn idealistojn, kiuj oferis ne nur penojn, energion, nervojn por la ideo pri kiu ili laboris, sed ankaŭ siajn rimedojn? — Kial do oni tiom kritikis Couturat ke li elspezis monon por ido, por kiu li laboris ideale (ĝuste aŭ malĝuste, tio estas alia demando), por kiu li oferis siajn rimedojn, kial tiaj aludoj kontraŭ mi, ke mi ricevis monon kiu ne eniris en mia poŝo?

Ni kliniĝu antaŭ ĉiuj, kiuj oferis por Esperanto, ĉar danke al tiuj oferoj hodiaŭ Esperanto ekzistas. Tamen se ni ne volas kliniĝi antaŭ tiuj, kiuj, laŭ vi, estis sur malĝusta vojo, sed kiuj laboris kaj oferis ankaŭ por ideo, la homeco postulas almenaŭ ne kulpigi ilin ke ili elspezis monon por la atingo de sia idealo, ĉar ili faris tion ne por persona profito, sed por la realigo de tiu ĉi idealo.

Konante vian idealismon pri la demando de la Lingvo Internacia kaj konsiderante, ke via verko havos historian signifon por la Esperantomovado en Bulgarujo, mi opinias, ke la klarigoj, kiujn mi donas pri la demandaj faktoj, nenie mallumigos viajn rememorojn, tial mi estas konvinkita ke vi ne rifuzos publikigi tiujn ĉi miajn liniojn.

Kun sinceraj salutoj,

Via kunbatalinto Th. Kaneff.

Noto de At. D. Atanasov. Dankante Sinjoron Kanev pri la korekto, farita de li, mi devas ankaŭ doni malgrandan klarigon. En la interparolo inter mi kaj Sinjoro Kanev (pri kio estas skribita sur paĝo 74 en mia verko kaj pri kio Sinjoro Kanev levas demandon), li diris en bulgara lingvo la jenajn vortojn: „Докато бѣше живъ Кутюра, луди пари прѣскаше за пропагандата на Идо“. Tiun idiotismon mi provis traduki per la frazo „li disemis multegan monon senkonte“, sed mi havis nenan intencon riproĉi tiun agon de la mortinta Couturat aŭ malvalorigi ĝin, nek mi iam havis intencon riproĉi Sinjoron Kanev, ke li ricevis monon por eldoni propagandilojn. Ne en tiu punkto certe ni malkonsentas kaj ne en ĝi mi serĉus la eraran vojon (laŭ mi) de kiu ajn idisto. Se iu fremdlanda esperantisto proponus ankaŭ al mi monon, por helpi la eldonon kaj vastigon de propagandiloj, nature mi akceptos tiun monon. Do, kun la opinio de Sinjoro Kanev pri tiu punkto mi konsentas plene.

A. d. a.

Libroj kaj gazetoj

(ni recenzas nur librojn, senditajn en du ekzempleroj).

Svenska-Eseranto-Tidningen, № 7, 8, 1925, Stockholm.

Pola Esperantisto, № 6—7, 1925, Warszawa.

Informoj, № 41, 1925, Tallin, Estonio.

La Suno Hispana, № 98, 1925, Valencia, Hispanujo.

Academia pro Interlingua, № 4, 1925, Torino, Italujo.

Heroldo de Esperanto, ricevata dufoje en la semajno, Herrem b. Köln.

International Language, № 8, 9, 1925, London, Anglio.

Eugenia, № 54, 55, 1925, Barcelona, Hispanujo.

Interligilo de I. P. T. T., № 8, 1925, Paris, Francio.

- La Suda Kruco, № 61, 1925, Melburno, Australio.
 Der Arbeiter-Esperantist, № 9, 1925, Berlin.
 Fluganta Skribilo, № 37, 1925, Seine, Francio.
 La Kolportisto, № 4, 1925, London, Anglio.
 Svenska Arbetar Esperantisten, № 7—8, 1925, Göteborg, Svedio.
 Bulteno, № 7, Julio, 1925, Antverpen, Belgio.
 Iran, № 6, Aprilo, 1925, Téhéran, Persio.
 Dziennik Ludowi, № 173, Lwow, Pollando.
 Munkaskultura, № 6, Septembro, 1925, Budapest, Hungario.
 Ekleksi, № 1, Aŭgusto, 1925, Roma, Italio.
 La movado, № 77—78, Aŭgusto—Septembro, 1925, Paris.
 Revista del Ateneo, № 13, Aŭgusto, 1925, Yerez de la Frontera.
 La nova tago, № 1, Junio, 1925, Hamburg.
 Litova stelo, № 8—9, Aŭgusto—Septembro, Kaunas, Litovujo.
 Itala esperanta revuo, № 5, 6, 7, 8, 9, San Vito al Tagliamento, Italio.
 Esperanto, № 300—301, Aŭgusto—Septembro, 1925, Genevo.
 T. E. K. A., № 11, Septembro, 1925, Lille, Francio.
 Tagiĝo, № 1, Junio, 1925, Birzai Litovujo.
 La Suda Kruco, № 62, Aŭgusto, 1925, Melburno, Aŭstralio.
 Sudameriko, № 7, 8, 1925, Montevideo, Urugvajo.
 La unuigita tuthomaro, Sept. kaj Oktobra numeroj, 1925, Hamburg.
 Oriento, monata ilustrita revuo en esperanto, № 1, Julio, 1925, eldono de la Esperanta eldona kompanio „Oriento“, Harbin, Novij Gorod, P. O. Box 35, Hinujo. Redaktoro: Inocento Serišev, 114 paĝoj.

Jen unu modela kaj serioza esperanto-revuo, vere laŭdinda laboro. En ĝi estas presitaj diversaj artikoloj pri Hinujo, Japanujo, Koreujo, Formoso, Mongolujo, Tibeto kaj Siberio. La teksto estas akompanata de multaj fotoĝrafajoj kaj bildoj, kiuj montras la vivon kaj la morojn de la orienta loĝantaro.

Esperanta Legolibro de B. kaj E. Migliorini, eldonanto A. Paolet, San Vito al Tagliamento, Italio, 1925. Paĝoj 144, prezo 5 italaj liroj.

La legolibro estas dividita je tri partoj: tra la vivo, tra la lingvo kaj tra la literaturo. Speciale interesa kaj valora estas la dua parto. Ĝi (la legolibro) estas kompilita el la plej bonaj verkoj de niaj eminentaj samideanoj. Por kursoj tre taŭga kaj alpreninda legolibro.

Redakcia Komitato:

Asen Grigorov — Zahari Zahariev.

ANONCOJ

estas pagataj 2 bulgaraj levoj por cm.

Ĉiu katoliko — Ĉiu interesato
pri Katolikismo nepre abonu
la monatan Revuon Ilustritan


ESPERO KATOLIKA

FONDITA DE PASTRO PELTIER EN 1903
Honorita per apostola Beno. 16-paĝa ; 27 × 18 1/2.

Enhavo:

Ĉefartikoloj pri Katolikismo. — Katolika
Esperanto-Movado — Esperanto-Movado. —
Katolika vivo. — Tra la Gazetaro. — Literaturo.

Jara abonprezo 20 fr. fr.



ADMINISTRACIO:

FINO LARROCHE

55, RUE DE VAUGIRARD

PARIS VI

Aŭstria Esperantisto
Howengasse 12-2-13, Korneuburg,
bei Wien
~~Aŭstrujo~~

VI NE KREDAS

kiom da valoraj instigoj al la esperantisto donas la abono al aktuala Esperantogazeto. Mendu tuj senpagajn specimenajn numerojn, ili certe konvinkos vin pri tio!

Heroldo de Esperanto

la aktuala organo de la Esperanto-movado aperas dufoje en la semajno, multenhava kaj ilustrita. Por ricevi senpagajn specimenajn numerojn skribu tuj al la administracio

Heroldo de Esperanto

Horrem b. Köln

(Germanujo)

En Bulgario abonigas BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO
str. Car Boris, 69 — Sofio.

Se la gazeto estos ricevata dufoje semajne:

20 numerojn 120.— lv.

Se la gazeto estos ricevata du numerojn kune:

20 numerojn 90.— „